# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

vendredon, la 3-an de Julio, 2015 • numero kvar

## Kio okazos hodiaŭ?



★ **8:30 –12:15 atm**
**Lecionoj en *Flowe***

★ **2:00 – 4:30 ptm**
**KTF-programo: filmado, en *Flowe***
Denove okazos filmado kun Ĵenja, Derek, kaj Karlo por la Kino-Teatro-Festivalo. Serĉu ilin en la unua etaĝo de *Flowe.* Vi povas partopreni en la filmado aŭ nur sidi kaj spekti, se vi preferas. Se vi ne interesiĝas pri filmado, ni okazigos alternativan programon samtempe:

★ **2:00 – 3:30 ptm, *Flowe***
**Tabulo-ludoj: venu kaj venku!**
Hoss gvidos pliajn tabuloludojn en klasĉambro de *Flowe*. Se vi havas proprajn ludojn kun vi, kunportu ilin kaj instruu al aliaj.

★ **7:00 – 8:00 ptm, en *Flowe***
**Metia kunsido pri scenarverkado**
Karlo MAYS kaj Paul GUBBINS daŭrigos la KTF-programon per prezento pri la arto de scenarverkado.

★ **8:10 – 9:00 ptm, en *Flowe***
Jarlo BILLS prezentos historion de la juda diservo “Bonveno al Sabato”. Poste li gvidos la diservon mem. Ĉiuj estas bonvenaj. (Vidu la plenan anoncon en paĝo n-ro 2.)

## Konsiloj* por novaj verkistoj

*Ray REDD*

** (ne tute seriozaj)*

Multaj el vi aspiras verki eseojn, artikolojn, novelojn, aŭ eĉ romanojn per la Internacia Lingvo. Jen iuj konsiloj por plibonigi viajn verkaĵojn:


- Nur kompletaj frazoj.
- Finu frazojn ĝuste trolongigitaj frazoj ĝenas la leganton.
- En eseoj artikoloj kaj fikciaĵoj, apartigu listerojn per komo.
- Ne uzu komojn, sennecese.
- Ne numeru listerojn, krom en (1) teknikaj raportoj, (2) registaraj dokumentoj, aŭ (3) juraj dokumentoj.
- Ĉiam uzu ĝuste la akuzativo; alie oni pensos ke vi estas idioton.
- Evitu (kiam eble) parentezajn propoziciojn.
- Ne uzu neniujn duoblajn negativojn.
- Krokodilaĵoj estas *uncool.*
- Aligatoraĵoj estas *verboten.*
- Uzado de raraj vortoj estas kurioza kaj fojfoje hida.
- En mia humila opinio, estas iel pli bone esprimi iomete forte kaj ne tro ofte uzi malfortigajn vortojn.
- Mi diris al vi milionfoje, ne troigu!
- Ĉu oni uzu maldecajn vortojn? Evitu tiun merdon!
- Laŭvortaj tradukoj de nacilingvaj slangaĵoj estas por la birdoj. Okdeksesu ilin.
- Zorge uzu vortojn kiuj similas al vortoj en via nacia lingvo. Ili povas havi malsamajn signifojn en Esperanto. Estas bona ĝenerala praktiko, kontroli la signifojn de vortoj per vortaro, aŭ libro aŭ retpaĝaro atingebla per digitala komputilo.




Notu: jen vera *digitalo*: herbo en la genro *Digitalis.* Rilate al komputiloj, pli taŭga vorto estas *cifereca.*

## Hodiaŭa ludo: *Mi trovis!*

Por tiuj, kiuj ne filmos, venu ludi kun Hoss en *Flowe* je la 2-a ptm. Hodiaŭ ni provos la kartludon *Mi trovis!*, en kiu oni priskribas bildojn kiel la jenajn:



**La NASKa Fasko**
**Redaktejo: Finley 112**
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al:
<nask.esperanto@gmail.com>

# Radiko-enigmo

*de Makis* DIRAS

En la suba liter-supo estas kaŝitaj Esperanto-radikoj: ili kuŝas en vicoj oblikvaj, horizontalaj, kaj vertikalaj. Ekzemple: en la unua horizontala vico, vi facile trovos la radikon **nask'**. Kiom da aliaj radikoj vi povas trovi? Morgaŭ aperos solvo.

| | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| N | A | S | K | U | Ĝ | R | I | J | C | O | R | M | Ĵ | V |
| E | I | Ŝ | O | Ŭ | R | F | L | T | U | Ĥ | Z | O | D | B |
| Ĵ | N | A | T | N | D | T | Ĉ | O | A | V | F | T | H | O |
| G | E | U | B | I | O | K | Ŝ | G | D | R | E | Ĉ | L | Z |
| I | R | T | F | N | G | R | A | K | T | I | A | L | E | S |
| K | N | E | D | E | A | V | Ŭ | N | E | K | G | P | B | I |
| I | K | R | F | O | P | E | M | O | K | S | L | J | A | Ŝ |
| T | O | P | S | L | Z | Ĥ | F | A | N | Ĉ | Z | R | V | F |
| J | F | C | A | D | E | R | D | N | E | V | I | T | H | Ŭ |
| C | Ĝ | R | L | U | P | K | A | S | Z | Ŝ | N | D | C | L |
| E | D | S | T | M | I | G | T | M | R | L | A | I | D | T |
| Z | J | P | B | Z | P | Ĥ | L | A | M | U | G | B | R | P |
| U | D | Ĝ | I | K | S | U | M | A | Ŝ | N | R | O | Ŝ | E |
| N | Ŭ | F | S | E | V | H | Ŭ | B | C | S | O | H | C | Ŭ |
| B | E | B | C | A | I | T | O | E | Ĵ | I | K | T | U | R |

# Senintencaj esperantaĵoj estas apud ni

Kiam NASK unue venis al la universitato William Peace antaŭ kelkaj jaroj, ni baldaŭ rimarkis, ke apud la kampuso troviĝas pluraj ŝildoj kun vortoj en tute bona (aŭ preskaŭ tute bona) Esperanto. Ĉu nur koincido? Aŭ ĉu… **komploto?!**




Eble la loĝantoj de Raleigh antaŭvidis, ke NASK venos al la universitato. Povus esti, ĉu ne? Nu… eble ne.

Jen unu ekzemplo de la suspektindaj ŝildoj, supre. Ĉu vi povas trovi aliajn? Se jes, nepre fotu ilin kaj kontaktu la redaktoron.

## *Bonveno al sabato*: prelego kaj juda diservo

Hodiaŭ Jarlo BILLS priskribos la enhavon kaj la historion de la juda diservo vespera, *Bonveno al sabato*. Poste, li gvidos la diservon mem, parte en Esperanto kaj parte en la hebrea lingvo, uzante nove tradukitan preĝlibron. Ĉiuj estas bonvenaj partopreni aŭ simple ĉeesti. La diservo konsistas preskaŭ tute el kantado, do se vi ŝatas kanti aŭ aŭdi kantadon, vi nepre ĝuos ĝin.

# *Imagu…!*

*de Paul* GUBBINS

Ĉu vi scias, ke la plej sukcesa kaj efektive altgrada leciono, pri kiu mi iam ajn (almenaŭ teorie) respondecis dum pli malpli 40-jara instruista kariero, okazis dum NASK?

Imagu… mi instruis en lernejoj, en universitatoj (eĉ je magistro- kaj doktoro-niveloj) sed la leciono, pri kiu mi pleje fieras, kaj kiun mi neniam forgesos, okazis dum NASK-sesio en Brattleboro, Vermonto, antaŭ dek jaroj.

Mi enprogramigis unu-horan sesion por diskuti la unuaktan teatraĵon *Korvo*, de la japana aŭtoro Kisaku Tabata, kaj poste mi planis transiri al alia temo. Tamen tiom viglis la diskuto, tiom plenis la blanka tabulo per notoj, ŝlosilvortoj, teorioj, ks., tiom engaĝiĝis kursanoj kun la teatraĵo, ke – kaj mi ne troigas – tri horojn poste, kaj eĉ dum la sekva manĝo-horo, oni daŭre argumentis, proponante diversajn starpunktojn kaj opiniojn. Mia sola bedaŭro: mi nek fotis la notojn sur la blanka tabulo, por ilin konservi, nek registris la klasĉambran diskuton.

Tute honeste mi povas diri, ke neniam en mia pedagogia vivo mi partoprenis tiom stimulan, pensigan sesion kun studentoj. Kaj, evidente, kiam mi provas klarigi al neesperantistoj, ke tio okazis en Esperantujo, ili rifuzas kredi, ne volas akcepti, ke, uzante la zamenhofan lingvon, eblas tiel mature interŝanĝi ideojn.

Nu… jen defio. Ĉu dum la ĉi-jara NASK eblos ripeti, eĉ superi, miajn spertaĵojn en Brattleboro? Mi esperas, ke jes!